

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 273 (40) - KVINA EPOKO

APRILON 1991



**ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO**  **KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO**

(Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785)
Apartat/Postkesto 290 - 08200 Sabadell - Catalunya/Katalunio. Tel. (93)716.36.33
(ekde lundo ĝis vendredo inter la 20a kaj 22a h.). FAX (93)727.42.08. Kolektiva
membro de Kooperativo de Literatura Foiro. Kun laborinterkonsento kun la Akade-
mio Internacia de la Sciencoj San Marino.

KOTIZOJ POR LA JARO 1991: Individua Abonanta Membro 1.600 p-toj; Individua
Subtenanta Membro 3.200 p-toj; Individua Dumviva Membro 32.000 p-toj; Kolektiva
Membro 3200 p-toj.

BANKO: Caixa de Pensions - agència 461 - Sabadell - konto: 550-53.

PLENUMKOMITATO DE KEA: Prezidanto: Antoni Grau; Vicprezidanto: Maria
Nuez-Garcés; Ĝenerala Sekretario: Llibert Puig; Kasisto: Óscar Puig; Komitata-
noj: Carles Berga, Bartomeu Costa, Josep Franquesa, Jordi Graells, Joan R. Gui-
ñón, Ĝirona Espero, Daniel Rubió, Josep M. Serrano.

KONTROLA KOMISIONO: Tomàs Alberich, Lluís Armadans, Ricard Jordana.

KATALUNA ESPERANTISTO: Hektor Alos, Ferriol Macip, Llibert Puig.

KONSERVANTARO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ: Gabriel Mora i Ara-
na (prezidanto), Jordi Carbonell i Pinyol, Timothy Brian Carr (florluda majstro), Ma-
nuel Casanoves i Casals, Bernard Golden (florluda majstro), Salvador Gumà i Clav-
ell, Miguel Gutiérrez Adúriz, Abel Montagut i Masip, Giorgio Silfer (florluda maj-
stro), Krystina Ungar (florluda majstro), Joan Ramon Guiñón i Roset (sekretario).

FLORLUDAJ MAJSTROJ: Clarence Bicknell (3aj IFL, Olot 1913), Artur Domènech
i Mas (6aj IFL, Reus 1916), Marià Solà i Montserrat (6aj IFL, Reus 1916), Josep
Ventura i Freixas (8aj IFL, Olot 1921), Jaume Grau i Casas (9aj IFL, Manresa
1923), Bernard Golden (20aj IFL, Vilanova i la Geltrú 1980), Giorgio Silfer (24aj IFL,
Olot 1984), Timothy Brian Carr (28aj IFL, Barcelona 1988), Krystina Ungar (30aj
IFL, Palamós 1990).

PEDAGOGIA KOMISIONO: Lluís de Yzaguirre, Abel Montagut, Joan Torres, Jo-
sep Tordera, Manuel Marqués.

VORTARA KOMISIONO: Jordi Carbonell i Pinyol - av. Paralel, 96-6è -tel. (h)
329.24.81, (l) 241.94.11 - 08015 Barcelona.

KOMARKAJ DELEGITOJ: Alt Penedès, Baix Penedès, Garraf: Joan Inglada i
Roig - St. Magí, 20-3r - tel (93)893.71.76 - 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf); Ga-
rrotxa, Ripollès: Joan Torres i Nalda - Escola Llar - Ctra. de la Canya, s/n - tel.
(972)26.38.29 - 17800 Olot (Garrotxa); Gironès, Alt Empordà, Baix Empordà, La
Selva: Ĝirona Espero - Apartat 509 - 17080 Girona (Gironès); Tarragonès, Alt
Camp, Baix Camp: Josep M. Serrano - Apartat 482 - 43080 Tarragona (Tarrago-
nès); Baix Ebre, Montsià: Josep M. Altadill - Berenguer IV, 23 - tel. (973)44.20.09
- 43500 Tortosa (Baix Ebre); Illes Balears: Xavier Margais i Basi - Orient, 60 - tel.
(971)61.38.30 - 07110 Bunyola (Mallorca); Catalunya Nord: Joan Fernández -
Henri Matisse, 21 - F-66000 Perpinyà (Rosselló).

KOLEKTIVAJ MEMBROJ: Centre d'Esperanto Sabadell - Apartat 407 - Papa
Pius XI, 130 - tel. (93)716.36.33 - 08200 Sabadell (Vallès Occidental); Centre d'-
Estudis de la Biblioteca-Museu Balaguer/Esperanto-Grupo - St. Gervasi, 45 -
08200 Vilanova i la Geltrú (Garraf); Centre Excursionista Puigcastellar/Esperan-
to-Grupo - St. Josep, 20 - 08922 Santa Coloma de Gramenet (Barcelonès); Club
d'Amics de la Unesco de Catalunya/Departament d'Esperanto - Mallorca, 207-
pral. - tel. (93)253.95.07 - 08036 Barcelona (Barcelonès); Esperanto-Centro Ta-
rragona - Apartat 1236 - 43080 Tarragona (Tarragonès); Esperanto-Fako "S. C.
Joventut Terrasenca" - St. Francesc, 52 - 08221 Terrassa (Vallès Occidental) -
Esperanto-Grupo "Jozefo Anglès" - Apartat 336 - 08190 Sant Cugat del Vallès
(Vallès Occidental); Firma Tero Esperanto-Fako Centre Comarcal Lleidatà -
Gran Via, 592 - 08007 Barcelona (Barcelonès); Grup Esperantista Sant Pau d'-
Ordal - Dr. Zamenhof, 12 - tel. (93)899.30.33 - Sant Pau d'Ordal (Garraf); Ĝirona
Espero - Apartat 509 - 17080 Girona (Gironès); Hispana Esperanto-Fervojista
Asocio - Apartat 15027 - 08080 Barcelona; Secció d'Esperanto Centre d'Estu-
dis Comarcals d'Igualada - Baixada de Sant Nicolau, 21 - 08700 Igualada
(Anoia).

Dipòsit Legal: B-27362 - 1982. Presita ĉe Jesús Pita (Barcelona)

Redaktora angulo

Certe vi ricevos rean surprizon kun
tiu ĉi numero. Eble vi jam alkuti-
miĝis al la nova aspekto de Ka-
taluna Esperantisto, sed vi certe
ankoraŭ ne vidis la novan Frekŭencies. Jen ĝi
estas nia donaco ĉi-foje. Sed ne plu! Vi de-
vas rapide aboni ĝin, se vi volas daŭre ĝin ri-
cevi.

Ni proksimiĝas al la somera feriado, kaj eble
vi ankoraŭ ne planis, kien iri. Ni proponas ĉi-
numere plurajn ideojn: kelkaj estas klasikaj
kongresoj, sed eble vi deziras sperti nov-stilan
Esperanto-turismon pere de niaj restadejoj.
Legu en niaj centraj paĝoj.

Ni tamen ankoraŭ ne deziras agrablan feria-
don, ĉar denove julie vi ricevos la plej lastajn
novaĵojn de nia kongreso en Taragono, kie
ĝuste ni pridiskutos la internacian turismon!

NASKIĜOJ

Júlia Collignon i
Simó naskiĝis la 24an
de aprilo. Ni sincere
gratulas kaj kisas la no-
vajn gepatrojn Éric kaj
Sílvia. La tuta estraro de
KEJ esperas, ke la
nuna heroaĵo estos nur
la komenca agado por almenaŭ duoblige nian mem-
braron. Ni pretas helpi la gepatrojn pri ĉio tiucele.



Laia de Yzaguirre i Hueso naskiĝis la 7an de fe-
bruaro. Gratulon al la gepatroj Ludoviko kaj Maria
Rosa kaj al fratĉjo Oriol.

25a kataluna kongreso de esperanto

Kiel anoncite, la 25a Kataluna Kongreso de Esperanto okazos en Taragono inter la 1a kaj la 3a de novembro ĉi-jare. La sidejo estos en la loka universitato, kiel kutime en niaj lastaj kongresoj.

Aprobigis la kongres-temo **Esperanto kaj turismo**. Por fakte pritrakti ĝin, oni invitis specialistojn, sed konkretaj nomoj ankoraŭ ne firmiĝis. Okazos debato dum la lasta kongres-tago. Ni invitas individuojn kaj kolektivojn prezenti spertojn kaj proponojn.


Preskaŭ certe ni sukcesos venigi al la kongreso elstaran sovetian aktivulon. Li prelegos al ni pri si-landa plej aktuala temo: **Perestrojko**. Cetere, li restos ĉe ni kelkajn tagojn post la arango, kaj nia Asocio proponas, ke li ripetu la prelegon en diversaj urboj, se invitoj venas.

Ankoraŭ ne konfirmiĝis la arta programo, tamen oni antaŭvidas modernan muzik-ensemblon kaj alian distran programeron.

Kredeble, la kongreso estos sufiĉe internacia pro la homoj, kiuj jam sciigis sian deziron partopreni: bulgaroj, litovoj, sovetianoj, portugaloj, hispanoj k.a.

Laŭeble ni kunsendos la aliĝilon kun ĉi tiu revuo. Ĝi ankoraŭ ne estas preta je la redakto-fino.

Nepre antaŭvidu vian partoprenon!



La foto montras la **Rambla Nova** de la kongres-urbo, ĉe kies fino staras la monumento al la kataluna admiralo mezepoka Roger de Llúria, simbolo de nia kongreso.

Freqüencies

Jen aperis revuo **Freqüencies**, kiun ni taksas la plej grava informa agado de la Esperantomovado en Katalunio de multaj jaroj.

La unuan numeron vi ricevas **specimene**. Se vi volas ĝin plu ricevi, bonvolu plenigi la aliĝilon, kiu estas en la revuo.

Kataluna Esperanto-Junularo estas ĝia eldonanto. **Centro Esperanto Sabadell** kaj **Girona Espero** subtenas ĝin. Membroj de tiuj societoj jam ricevas la revuon aŭtomate. Por grupoj, kiuj deziras abonigi siajn membrojn ekzistas specialaj rabatoj. Prezure membroj de la redaktora teamo prezentos la revuon en la grupoj, kaj des pli bone se tio okazas en pli largaj kaj malfermitaj rondo. Por ĉio ĉi bonvolu kontakti **Freqüencies**.

Kursoj en Barcelono

Dum junio kaj julio okazos tri samtempaj elementaj Esperanto-kursoj en Barcelono. Ilin gvidos **Carles Berga**. Jen la datumoj por ĉiu:

- Casal de joves d'Horta
Pl. Eivissa n-ro 17
tel. 358 61 07
vendrede de 19.30 ĝis 21a h.
3.000 p-toj
- Club d'Amics de la Unesco de Barcelona
Mallorca n-ro 207 pral.
tel. 453 95 07
merkrede de la 19a ĝis la 20.30 h.
membroj: 2.000 p-toj, nemembroj: 4.000 p-toj
- Llibreria Esperanto
Carreras i Candi n-ro 34
tel. 240 26 62
lundede de 19.30 ĝis 21a h.
3.500 p-toj

Kie ferii kaj samtempe esperantumi? la internaciaj restadejoj

Fariĝis tradicio ĉeesti la internaciajn kongresojn por praktiki la lingvon kaj trovi novajn esperantistajn amikojn. Tamen tiaj kongresoj imponas ne nur al la ekstera publiko, sed ankaŭ al la kongresanoj mem: ja la abundo da homoj kaj da programeroj kelkfoje ne digesteblas. Manko da tempo estas la komuna sento, kiu povas krei veran frustracion. Sed certe la kongresoj nepre utilas por la ekstera prestiĝo de nia movado.

En la lastaj jaroj aperis tamen interesa alternativo al la kongresoj. Temas pri tiuj restadejoj, kie en esperantista etoso oni povas trankvile ferii, studi kaj daŭre praktiki la lingvon.

Dojeno de la eŭropaj restadejoj, de post 1952, estas la kastelo de Grésillon. Ĝi situas en Baugé (Francio) kaj funkcias nur inter mezo de junio kaj fino de aŭgusto kun kvin du-semajnaj restadoj. Granda arbaro 18-hektara ĉirkaŭ la

kastelo, lageto antaŭ ĝi kaj aparta baseno fariĝas specialaj alogaĵoj por ĉiam altiri vizitantojn.



Ankoraŭ en Francio troviĝas juna restadejo, La Kvinpetalo, fama pro siaj tre interesaj staĝoj.

Georges Lagrange kaj Suzanne Bourot gvidas ĝin en vilaĝo Bourresse, proksime al Poitiers.

Kaj en Svislando, en urbo La Chaux-de-Fonds, rande de montaro Juraso, staras alia restadejo: "Gastejo Edmond Privat" de KCE (Kultura Centro Esperantista), kie oni organizas dum la tuta jaro multajn alloge diversajn staĝojn.

De antaŭ nelonge, "La Vojnodo" aliĝis al tiu reto. Ĝi funkcias en vilaĝo Hastière (Belgio).

Kaj ni ne forgesas la bulgaran Internacian Esperanto-Kursejon en Rodopi-montaro, kiu laboras la tutan jaron, aŭ la bele antikva slovaka domaro proksime de urbo Proprad.

Jen kion proponas al vi tiu alternativa, aktiva kaj daŭre kreskanta Esperanto-komunumo.

Nia Asocio volonte disponigos senpage la agadprogramojn de tiuj restadejoj al niaj legantoj, kiuj petos ilin.

Llibert Puig i Gandia

someraj kongresoj kaj renkontiĝoj

El la dekoj da aranĝoj dum la somero, jen kelkaj el la plej famaj kaj proksimaj. Ni vere bedaŭras ne aldoni pro manko da loko plurajn treege allogajn (i.a. el eks-Sovetio)...

Internacia Literatura Forumo

15an-31an de junio, Budapest (Hungario)

temo: "Kalocsay kaj Baghy: ĉu (nur) poetofratoj?"

Ĉe-semnario por E-instruantoj

02an-09an de julio, Stambulĉic/Pale (Jugoslavio?)

Prelegoj kaj kursoj omage al Baghy kaj Kalocsay

09an-22an de julio, Grésillon (Francio)

Seminario: Instruado de Esperanto

11an-16an de julio (unua parto)/18an-23an de julio (dua parto), Kvinpetalo, Bouresse (Francio)

Internacia Esperanto-Universitato

13an-17an de julio, Veliko Tarnovo (Bulgario)

Prestiga aranĝo en neforgesebla urbo

Kun santempaj ekzamenoj de ILEI/UEA

Hispana Kongreso de Esperanto

15an-19an de julio, La Laguna (Kanario)

Internacia Junulara Kongreso

20an-26an de julio, Karsloga (Svedio)

La tradicia IJK, je duoblaj prezegoj...

La BEMI-karavano e-kas ĉi-jare en Bremen je la 9a

Universala Kongreso de Esperanto

27an de julio-03an de aŭgusto, Bergen (Norvegio)

Internacia Junulara Semajno

01an-07an de aŭgusto, Esztergom (Hungario)

Alternativa junulara renkontiĝo, kiu jam tradicias, kvankam sufiĉe "kumbaja"-as. Ĝi fariĝos ĉi-jare la plej granda kunveno de junaj esperantistoj, ankaŭ kun kataluna grupo.

Internacia Konferenco de ILEI

03-08 de aŭgusto, Voss (Norvegio)

Internacia Lernejo por Funkciuloj de E-Asocioj kaj Organizaĵoj

17an-30an de aŭgusto, Proprac (Slovakio)

Teatra Staĝo

22an-27an de aŭgusto, Kvinpetalo, Bouresse (Francio)

Itala kongreso

23an-26an de aŭgusto, Torino (Piemonto)

Temo: Esperanto por la defendo de la etnaj lingvoj kaj kulturoj

Kun partopreno de minoritatoj: okcitanaj,

germanoj, slovenoj, romanĉoj k.a.

Internacia Semajno

24an-31an de aŭgusto, Franciaj Alpoj

Escòla Occitana d'Estiu

26 an - 31an de Aŭgusto, Fumel (-Naut Agenés-Òlt e Garona-Okcitanio)

Pupteatra Internacia Festivalo

27an de aŭgusto-1an de septembro, Zagreb (Kroatio)

Sanmarina Universitata Sesio

30an de aŭgusto-9an de septembro, Sanmarino

Internacia Semajno

07an-14an de septembro, Seta (Okcitanio)

Seminario: la propraj Esperanto-bibliotekoj

11an-13an de oktobro, Vraca (Bulgario)

Kun santempaj ekzamenoj de ILEI/UEA

Siberia tendaro en Valencio

Paske HEJS organizis sian tradician tendaron en Valencio. La okazo bonis nur por ripozado kaj longaj babiladoj, ĉar preskaŭ nenio okazis el la anoncitaj programeroj (krom progresigaj kursoj kaj vizitado al Valenci-urbo). Tion ni ne povis bedaŭri, ĉar la kampejo, kie kuŝis niaj tendoj, apud la plaĝo, tute taŭgis por tio.

La tipo de partoprenantoj komplete respegulas la ĉiaman stagnon de la junulara movado en Hispanio: nur du-tri bonaj Esperanto-parolantaj HEJS-anoj ĉeestis. Alvenis neniu andaluso, nur unu madridano, nur du nevideblaj geeŭskoj ktp.

El la movada vidpunkto, la kvar partoprenantaj KEJ-anoj rimarkis la kompletan fantomigon de HEJS, ĝian faktan neekziston. Eventualaj agadoj estas faritaj de du-tri unuopuloj dise tra la lando.

La fina organiza kunveno, ŝajne rapide decidita ĉar eksterprograma, estis ridinda (aŭ priplorinda): la ĉefa klopodo estis elpensi nomon por HEJS aŭ Hispanio, kiu povus aligi la katalunojn. En tiu mizera panoramo, la agado de KEJ, nekontentiga sed pli kompakta, vidiĝas kiel mirindaĵo. Anstataŭ Iberia Renkontiĝo ni ŝerc-pike proponis: Siberia, Liberia, Unu-Grande-Libria, Pesetia k.a.

Memkompreneble la problemo ne fontas el nomaj aŭ miope politikaj problemoj. Kiel ni diris, la bazo sur kiu kuŝas la Esperanto-agado radikale malsamas en Katalunio kaj, almenaŭ, en la kastilingva parto de la hispana ŝtato.

La kompreno pri la lingva problemo tute diferencas kaj la lingvo por la varbado kaj instruado estas alia.

KEJ, kiel ĝi plurfoje jam pruvis, tre volonte akceptas kunlabori por klare difinitaj projektoj. Ekzemplo de tiaj estas komunaj aranĝoj, kiuj povus fariĝi tradiciaj, se HEJS ekviglus kaj konstantus, kio estas nia plej sincera deziro.

Nia sincera rekomendo al HEJS-anoj tamen estis, ke ili ne tiom zorgu momente pri organizaj problemoj, sed ke ili starigu bazon por posta efika laboro, verkante lernolibrojn kaj informilojn kaj kreante pli fortajn lokajn societojn.

haf

Pri lingvo en Valencio (skizo)

Jen kelkaj disaj spertoj pri la lingva situacio ĉirkaŭ Valenci-urbo.

Nia unua surprizo ekparolante centran katalunan estis, ke oni nin demandis: "ĉu ankaŭ vi parolas valencie?"

- Kompreneble, ja jes! -ni rideme respondadis.

Dua interesa konstato estis la grandega kontrasto inter valenci-parolantoj kaj tiuj, kiuj tute ne komprenas ĝin (aŭ ne volas ĝin kompreni). Ni certigis, cetere, ke la ne-komprenantoj tute ne diferencigas valencian kaj centran katalunan: "Pardonu, sed mi ne parolas valencie" oni plurloke respondis al ni hispane. Ankaŭ

murcianoj tute ne sentis malsamojn, ĝis kiam inteligentulo fine rimarkis "la" diferencon: valencianoj foje prononcas ĉ-on, kiam katalunoj eldiras ĵ-on!

Fine, ni terurigis pro la priplo-rinda publika agnosko de la valencia: ĉiuj strato-tabuletoj hispanis, dum nur maloftege aperis du-lingvaj. Katalune nur troveblis ĉe la Ĝeneralitato. Ankaŭ reklamaj kaj vendejaj afiŝoj nur fremdlingvis. Eĉ, pugno-frape, ĉie oni povis legi "La Caixa - caja de pensiones" k.s.

Ni konkludis jene: nepre ne zorgu pri la lingvo-nomo. En Valencio katalunoj parolas valencie, kaj oni senprobleme akceptas tion. Kompreneble, oni prefere ne alfrontu simbolojn, ĉefe la lingvonomon, kiu enradikiĝis jam mezepoke. Atentu, ke ankoraŭ multaj eĉ ne komprenas la lokan lingvon ĉe la ĉefurbo, kaj ĉiukaze ĝia socia valorigo estas ankoraŭ atingenda. Kaj elreviĝu nun pri nacia sento alia ol tiu de hispanoj valenci-lingvaj; katalunismo estas pli ol minoritata. Restas longa vojo por tio.

fmb-haf

**Partoprenu
la KEJ-
renkontiĝon
apud
Vilafranca
30-31 de junio**

Gerda Malaperis!

La ĉiama problemo pri tradiciaj lingvo-kursoj estas la enuo de la lernantoj post la unuaj lecionoj pro la unu-toneco de la materialo. Iel instruisto devas alporti novaĵojn.

La lerno-libro **Gerda Malaperis** de Claude Piron prezentas interesan formon solvi la problemon, ĉar la lecionaj tesktoj formas... tutan krim-romanon! Jam ekde la dua leciono okazas fakto suspektinda kaj baldaŭ homo malaperas. Certe krimromano estas bona elpensajo por katenigi lernantojn al kurso, samkiel jam faris antaŭe ankaŭ Reto Rossetti.

La libreto cetere enhavas nur la tekstojn, kaj ĉiu povas legi ĝin kiel memstaran romanon. Malgraŭ la simpleco de la vortaro kaj kelkaj vort-ripetiĝoj, la verko estas leginda pro si mem, kaj tre speciale por fruaj lernantoj.

Enkondukiĝis interesa eksperimento en Barcelono pri ĝia uzo: la lernantoj memstare legas la romaneton kiel hejman taskon. La celoj estas pluraj. Unue, fiksigi la konojn akiritajn dum la regula kurso, enkondukante nur minimumon da novaj. Due, la lernantoj sentas, ke ili povas eklegi libron per la nova lingvo. Tio psikologie estas esenca faktoro. Fine, alvenas la scivolemo malkovri la finon de la romano, kio devas motivigi la lernantojn daŭrigi sian lernadon.

Ĉiokaze, pri la libro, mi rediru, ke ĝi estas perfekta por komencantoj, kaj pro ĝia malmultekosteco vere vokas acetadon.

haf

- **Gerda malaperis!** (lingvo-instrua romaneto); Claude Piron; FONTO, 1983; 48 p.; 21x14; 400 p-toj.

Klasika amuzilo por progresantoj

Kredu min sinjorino tute prave fariĝis jam de antaŭ kvardek jaroj unu el la plej rekomenditaj legaĵoj por progresantoj. Tion helpas du kialoj: unue, la viveco de la lingvo, riĉe kaj profunde Esperanta, kaj due, la strukturo de la libro mem, kiu estas kolekto de anekdotoj tra la vivo de la aŭtoro Cezaro Rossetti, Tiĉindevena skoto. Se al tio ni aldonas la gajan spritecon de la rakonto, ni atingas vere legindan verkon.

La libro estas amuza priskribo, ĉefe de la profesia vendista vivo de Rossetti. Multaj anekdotoj estas bonegaj kaj kelkaj eĉ neforgeseblaj.

Tre plaĉa estas la titoligo de la ĉapitroj per proverboj, kiuj plifortigas la profundan Esperantecon de la libro: iel la kolportisto fariĝis la Ŝvejk, Baj Ganjo aŭ s-ro Esteve de nia komunumo (certe tio estas pli inda simbolo ol multaj, kiujn ni superhavas!).

Nu, jen kelkaj titoloj: "ne gustas mielo el la ĉielo", "Petro kornojn tenas, Paŭlo lakton prenas", "virina lango buĉas sen sango", "trafas pugno pugnon", "virina rideto pli kaptas ol reto", "Petro rifuzas, Paŭlo ekuzas", "inter lupoj krii lupe", "sperto saĝon akriĝas", "malsaĝuloj kreskas mem, sen plugo kaj sem", "fripono




ĉiam sian nomon skribas", "kontraŭ ĉiu malfacilo ekzistas konsilo", "per lerta admono alfluas la mono", "multe da spirito sed neniom da profito", "vorto amema el buŝo blasfema", "dekstra mano ne sciu kion faras la maldekstra", "tute libera kiel birdo aera", "sorto flatas, sorto batas", "ricevis bandido laŭ sia merito", "lupo sopiras, al arbaro sin tiras", "granda parolisto estas duba faristo", "se io venas al buŝo, buŝon ne fermu", "sorto ofte alsendas, kion ni ne atendas". "ĉiu 'li' havas sian 'ŝi'", "du botoj faras paron", "aliajn gvidas kaj mem ne vidas".

Bedaŭrinde Cezaro Rossetti, kiu, cetere, estas frato de la fama membro de la Skota Skolo Reto Rossetti, forpasis antaŭ la apero de sia verko. Ĝi estas la nura, kiun li postlasis al ni.

Certe pri la boneco de tiu libro parolas ankaŭ la antaŭ ne longe aperinta tria eldono.

haf

Eŭska kverko



Jen sugestoplena nomo por tiu revuo, kies unuan numeron eldonis Eŭska Esperanto-Asocio. La Gernika kverko fariĝis la simbolo de tiu unika kaj brava popolo kaj la nomo de la urbo mondfamigis pro la esprimiva pentraĵo de Picasso.

La novaperinta revuo celas diskonigi la diversajn aspektojn de la eŭska vivo. Temas pri 20-paĝa eldonaĵo en formato DIN A4, riĉe ilustrita kaj grafisme belaspekta, sed tro da eraroj maku- ligas la tuton.

Bedaŭrinda rezulto al tiu nobla laboro, sed tio ne malkuraĝigu nian eŭskajn kolegojn. Se ili kapablas eldoni similajn revuojn, certe lingvo-kontrolantoj pretos ilin helpi.

llpg

- Abonebla ĉe Esperantista Grupo de Bilbo: Barrenkale Barrena, 7-1-dks., 48005 Bilbo (Biskajo).

Descolonisar l'istòria occitana. T.II L'enemic dins la clòsca

La panoramo de la historio instruata en la franca ŝtato, krom feke kaj fike, fake koloniismas. La kaŝo de tio, kio dubigas la liberecajn, egalecajn kaj fratecajn valorojn de l'heroa Patrujo, estas vere franca fako.

Pro tio do, Joan Larzac, fama okcitana poeto kaj verkisto, kreis du-voluman historian verkon. "Jen libro ne de historiisto, sed de historiema leganto okcitanisma..." diras la aŭtoro enkonduke de sia libro. Fakte, se Larzac ne estas fakulo pri historio, li multge esploris por fine krei tiun ekzistindan verkon.

"L'enemic dins la clòsca", estas la dua libro, kaj, laŭ mi, la plej interesa.

La verko estas du-parta:

La unua parolas pri la okcitanoj kaj la franca revolucio: malsamo inter kialoj kaj rezultoj de la revolucio, la lingva problemo, la kontraŭ-revolucio, la federaciisma provo, la milito kontraŭ la nefrancaj lingvoj...

La dua parolas pri konscien- ciiga jarcento por la okcitanoj, pri reagoj, ribeloj ktp. Tio konkludis per la venko de la franca koloniismo.

La libro estas verkita en la lingvodoka dialekto de la okcitana. Ĝi estas la plej simila al la kataluna, kaj tute facil-legas por katalunlingvanoj.

fmb

- Descolonisar l'istòria occitana, T.II L'Enemic dins la clòsca Institut d'Estudis Occitans, colleccion A Tots 1977, 232 p.

El la vivo de Bervalá sentaŭgulo

Se vi ankoraŭ ne legis ĉi tiun libron, kion vi atendas? Mendu, prunteprenu aŭ simple ŝtelu ĝin!

La aŭtoro ankoraŭ ne aperas inter la nomoj de famaj Esperantaj verkistoj, pri kiuj ni legas en antologioj aŭ aŭdas en prelegoj, sed per sia kapablo ironii pri nia movado, per sia rafinita humoro kaj per la originaleco de siaj rakontoj, li plene meritis unuarangan lokon.

Tra dek du senrilataj epizodoj vi ekscios i.a., kiel Esperanto faciligis al geamantoj iliajn renkontojn, aŭ la tutan historion de U.E.A. (Unuigo de Esperantaj Amordomoj), aŭ kiel oni povas propagandi Esperanton per seksatencoj.

Post la legado de ĉi tiu libro vi povos ankoraŭfoje kompati viajn amikojn, kiuj obstine rifuzas lerni Esperanton malgraŭ via senĉesa propagando. Ili ja ne scias, kion ili perdas.

Pedro Martín Burutxaga

- El la vivo de Bervalá sentaŭgulo; Louis Beaucaire; Eld. Stafeto, 136 paĝoj, 12x18 cm; 800 p-toj.